

NIA VOĈO

Madrida Esperanto-Liceo

San Alejandro 6-4°B-Ext. 28005 Madrid
(Nur poŝta adreso)

Ni kunvenas lunde je la 18,30 en Rodríguez San Pedro 13-3º-7

Redaktas kaj eraras: Lupe Sanz

APRILIO 2007

IBERIA RENKONTIĜO 2007

Kun rekorda ĉeestantaro okazis la Iberia Renkontiĝo 2007, de la 9a ĝis la 11a Marto, en la Junulargastejo "San Fermín", de Madrido. La ĉefa salono estis plenplena dum la diversaj programeroj, inter kiuj elstaris prelegoj de Jorge Camacho pri "Verki kaj legi en Esperanto"; de Toño del Barrio pri "Esperanto kaj Intercivitana Milito" kaj de Félix Lobo pri "Ornitologio". Krome, okazis esperantaj kursoj: unu gvidita de Farri (Ferriòl Macip) kaj alia pri lingva dubosolvado, de António Martins. Oni povis ĝui la amuzan kvizon de Toño del Barrio "Ĉu vi volas esti milonulo", kies plej alta premio atingis 100 milonojn da eŭroj, do, 10 cendojn. Same interesa estis la demonstracio de Juan Antonio del Castillo pri "Kartludoj kaj aliaj agrablaj amuzaĵoj". Dimanĉe matene okazis vizito al Madrido: fotoj pri tiu urba ekskurso videblas en la retpaĝo de Joan Inglada:

<http://entitats.vilanova.org/esperanto/iro2007/index.html>

ESPERANTO EN INTERRETO

La interreta enciklopedio "**Vikipedio**" en Esperanto jam havas pli ol 67.000 artikolojn. La Prezidanto de Eŭropa Esperanto-Unio kuraĝigas vin ĉiujn verki artikolojn, eĉ malgrandajn, por Vikipedio en Esperanto. Tiu ĉi konsiderinda artikolaro donas pozitivan bildon pri la uzebleco de Esperanto, multe pli forta ol la kutimaj argumentoj. Ni agu - ni atingu 100.000 artikolojn en la Esperanta vikipedio ĉi-jare. Toño del Barrio invitas vin legi sian artikolon en "Libera Folio" pri la afero:

<http://www.liberafolio.org/2006/barriovikipedio/>.

La revuo "**Oomoto**" aperas nur en elektronika eldono: www.oomoto.jp/esrevuo/Oo453.pdf

La oficiala himno de la Festivalo de la Tero okazonta samtempe en 24 landoj de la 18a ĝis la 24a Junio 2007, kantata esperante far la infana koruso Les Petits Chanteurs de Meaux (Francio) estas aŭdebla kaj videbla kiel video-filmeto en jena adreso:

<http://www.youtube.com/watch?v=-SnVQnIS2rs>.

Jam estas eŝutebla la PDF-versio de la aprila numero de la revuo **Esperanto**.
<http://reto.uea.org> nur por UEA-membroj.

KURIOZAĴOJ

La Teatro Español, en Madrido, prezentas la teatraĵon "**Homebody / Kabul**" de Tony Kushner. Tie aperas kelkfoje Esperanto: iu rolulo parolas ĝin kaj pri ĝi. Ankaŭ, en la broŝuro de la teatraĵo oni parolas pri Esperanto. Ĝi videblas ĉe la ttt-paĝo: <http://www.homebody-kabul.com>. Rigardu tie "Glosario". Pedro Hernández diras ke antaŭ kelkaj monatoj oni kontaktis lin por traduki la tekstojn kaj instrui la aktorojn, sed post tiu unua kontakto oni ne plu kontaktis lin. Iu scias kiu faris la laboron? La estraro de la teatro akceptis disdoni al spektatoroj diversajn flugfoliojn pri esperanto provizitajn de Madrida Esperanto-Liceo.

Toño del Barrio trovis du nuntempajn **hispanajn homojn kies nomo estas "Esperanto"**: Juan Esperanto Ferreira Saborit el Bilbao kaj Esperanto López Catalán. Alcázar de San Juan (Ciudad Real).

La aŭstria esperantisto Anton Oberndorfer enretigis filmeton je daŭro 2 minutoj kaj 30 sekundoj pri **Madrido**, filmita far Roĝer Borĝes kaj Olga Cervera. Ĝi estas parolata esperante kaj, kurioze, kun subtitoloj en la sama lingvo: <http://aldone.de/video> aŭ rekte en: <http://www.youtube.com/watch?v=pT6mBHcXSjM>.

Esperanto kontraŭ Alzheimer. Dulingvaj homoj havas pli bonan mensan koncentrigon kaj eĉ povas prokrastigi cerbajn malsanojn kiel Alzheimer. Tiel oni deduktas el studo farita en la Universitato de Barcelono kun monolingvaj kaj dulingvaj homoj scipovantaj la katalunan kaj kastilian. Ankaŭ simila studo okazis en Kanado. Do, scipovo de dua lingvo, kiel Esperanto, estas bonega por nia sano! Kaj despli bone se oni scipovas tri aŭ pli. Legu interesan artikolon pri tiu temo en "El País":

<http://www.elpais.com/articulo/salud/bilinguismo/mejora/atencion/elpepusoc/20070320elpepisa/3/Tes>

VENONTAJ KONGRESOJ

92a Universala Kongreso de Esperanto 2007, Yokohama (Japanio), 4a / 11a Augusto.

66a Hispana Esperanto Kongreso. Palos (Huelva) kune kun 12a Andaluzia E-Kongreso, 5a - 8a Julio.

7a Eŭropa Esperanto Kongreso. Maribor (Slovenio), 28a Julio ĝis 4a Aŭgusto.

15a Internacia Esperanto-semajno de la Kulturo kaj Turismo. Tossa de Mar, 29a Sept. - 6a Oktobro.
6-a Someraj Dialogoj. Monistrol de Montserrat (Barcelona), 8a - 9a Septembro .

La kotizo de MEL por la jaro 2007 estas 12,00 eŭroj

Vi povas pagi la lundon en nia konversacia rondo (Rodríguez San Pedro 13-3^o-7) aŭ al Esperanto Liceo de Madrid, Banco Sabadell/Atlántico konto
0081 7110 98 0001266730

HISPANA ESPERANTO-FEDERACIO

La Sekretariino, Carmen Suárez, deĵoras lunde vespere (17,00-20,30h), dum aliaj tagoj vi povas faksi aŭ telefoni al 91 446 80 79 (aŭtomata respondilo) aŭ kontakti rete: admin@esperanto.es
 INFORMO pri kotizo, hoteloj, ktp pri la **Hispana Esperanto-Kongreso 2007**, Palos de la Frontera (Huelva) ekde 5a ĝis la 8a de julio.

<http://congreso.esperanto-andalucia.org>

(hispane) kaj

<http://kongreso.esperanto-andalucia.org>

(esperante)

SUBVENCIO AL HEF-GRUPOJ

La Estraro de HEF aprobis en la buĝeto 2007 konton de 500 eŭroj por subvencii al la esperantaj grupoj membroj de HEF. La celo de la subvencio estas partopreno en foiroj aŭ ekspozicioj.

Limdato la 30an de Novembro 2007

Pli da informo en www.esperanto.es

Finfine HEF gajnis la batalon kontraŭ la telefonkompanio ONO. Ĝi malkonektos la servon kaj nuligos la fakturojn.

"BOLETÍN" Ĝi jam videblas rete same kiel aliaj prestiĝaj gazetoj en Gazetoteko Lanti kaj ankaŭ ĉe <http://eo.lernu.net/biblioteko/gazetoj/boletin.php>. La Hef-bibliotekistino, Ana Manero, laboras por baldaŭ disponigi la kompletan kolekton en la paĝaro de HEF: www.esperanto.es

HEF vendas po 4 eŭroj (5 kun sendo-kosto al Hispanio) la DVD (por uzi en komputilo)

"Elektronika Esperantio"

la plej ampleksa informilo pri nia lingvo en multaj lingvoj inter ili hispana kaj Esperanto

VENONTAJ PROGRAMOJ EN MADRIDO

Laj konversacia-rondoj kiujn organizas Madruda Esperanto-Liceo okazas ĉiulunde, ekde la 18.30 h, en RODRÍGUEZ SAN PEDRO 13-3-7 Tel. 91 446 80 79: **PRELEGO**: 16 aprilo: ronda tablo pri "Boletín". 18.30 horo.

KURSOJ:

Vallecas. Pedro Hernández organizas bazan kurson, sabate je la 17,00-a horo kaj je la 18,30-a meza nivelo. Tel. 91 507 90 84/85 kaj 667 721 951

Tetuán. Alejandro Pareja gvidas bazan kurson en "Biblioteca Pública Vázquez Montalbán", Francos Rodríguez 67, (Metroo Francos Rodríguez). La kurso estas por komencantoj, senpaga, kaj la lecionoj okazos la mardojn je la 7a vespere. Aliĝu ĉe la biblioteko, 91 398 07 23

ESPERANTO LICEO DE MADRID

Asociación de Utilidad Pública Municipal

San Alejandro 6- 4^oB EXT

28005 Madrid